

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 518

DECEMBRO 1948

Se interesa romano plaças al vi, nepre legu la libron

MORTO DE TRAJNO

de FREEMAN WILLS CROFTS

El la angla lingvo tradukis

MASON STUTTARD

256 paĝoj. Bindita 9 ŝilingoj, aŭfranko 6p.

“Morto de trajno”, stranga titolo por libro, ĉar la personigo de objekto estas jam per si mem io nekutima kaj deŝ pli de objekto kiel trajno. Rakonti al vi pri la enhavo de ĉi tiu libro ni ne faros. Ĝi estas streĉa kaj . . . implikita. Sufiĉu, ke temas pri spionado de Germanoj en Anglujo en la dua mondmilito. Kompreneble estas Scotland Yard, kiu finfine savas la tutan aferon, sed antaŭ tio okazas la leganto ĝuis ĉiujn friponaĵojn kaj lertaĵojn, kiuj estas propraj al detektiv-romano. “Morto de trajno” estas libro, kiun oni finlegos en unu fojo:

Kiu ŝatas detektiv-romanojn, aĉetu tiun ĉi libron, kaj ankaŭ kiu ne kutimas legi tiajn librojn, legu “Morto de trajno”. Oni ne bedaŭros la uzitan tempon!

Laborista Esperantisto

■
Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe ĝia agentejo en via lando aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Senpagan provekzempleron de interesa politika (esperantlingva) gazeto postulu ĉe "Ukraina Esperantisto," Leonrodstr. 2, (13a) Bayreuth, Germanujo.

Libroposedantoj, kiuj volas vendi aŭ interŝanĝi librojn pri Kabbalah-doktrinoj kaj libron de Edith Mikeleitis "Das Ewige Bildnis," sin turnu al S-ro A. G. Hoekma, Laan van Eik en Duinen 20, Den Haag, Nederlando.

Poŝtmarkkolektantoj! Oficiale eldonita "bloko"—8 polandaj poŝtmarkoj de "kultura serio" (vendprezo ĉirkaŭ 2 dolaroj)—ŝanĝebla kontraŭ teo aŭ kakao por malsana fraŭlino. Turnu al ĉefdelegito de Pollando, R. Sakowicz, Parafialna 3, Nowa Sól. Aldonu respondkuponon por eventuala respondo.

Juna Ĉeĥoslovakio deziras korespondi tutmonde per ilus. kartoj eĉ leteroj. Mi interŝanĝos pm. Respondo garantiata. Ján Šága, České Brezovo, okres Lučenec, Ĉeĥoslovakujo.

Kiu akceptas gebaptopatrecon (ankaŭ ne-esperantistoj) de mia en decembro naskiĝonta infano? Skribu tuj al Prof. Gauder, Rónaystrato 2/b, Győr, Hungarujo.

Mi ŝatus korespondi. La tuta mondo interesas min. Certe respondos. Margareto Petrás, Körösi Csoma S. utca 74, Békés, Hungarujo.

Deziras interŝanĝi neuzitajn pm. en serioj Kuanchi Li. 2 Hungren Li, (1) Kweiyang Road, Tientsin, Ĉinujo.

Filatelistoj! Amalia Amico de Meane, Via Cellini 36, Torino, Italujo, deziras interŝanĝi pm. kun la tuta mondo kaj korespondi pri ĉiuj temoj. Nepre respondos.

Enrico Bocciano, Piazza Vittorio Veneto 6, Lavagna (Genova), Italujo, interŝanĝas poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj, laŭkvante aŭ laŭ katalogo.

Helpu la portugaliajn Esperantistojn! La portugala Esperanto-movado renaskiĝas sub la malsimpatia rigardo de la registaro, tial ĝi bezonas la helpon de ĉiuj Esperantistoj. Helpu tiujn samideanojn per sendo de unu esperanta libro por ties cirkulanta biblioteko. Sendu al Portugala Esperanto-Ligo, Apartado 125, Lisboa N.

Kristana Asocio de Junuloj (Y.M.C.A.), Lerchenstr. 2-4, (23) Bremen, Germanujo nun aranĝas tri Esperanto-kursojn. Oni intencas fondi propran Esperanto-klubon kun biblioteko, sed mankas la rimedoj. Helpu al forta sukceso per simpati-leteroj kaj libro-donacoj! La entuziasmo ne mankas. Fortaj danko kaj eĉ estos certaj al ĉiu helpemulo. Menciuj "Esperanton".

Franjo Hocenski, Slav. Orahovica, F.N.R., Jugoslavujo, deziras interŝanĝi leterojn kaj ilus. kartojn kaj poŝtmarkojn. Certe respondos.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn tutmonde; nepre respondos; Chih-Shen Wang, 10 Tsingyuan Li, Pukow Road, (6) Tientsin, Ĉinujo.

Eneido. Kiu volas vendi al mi "Eneido" de Virgilio, trad. Valienne? S-ro Ebbe Vilborg, Älvsborgsgatan 50, Göteborg, Svedujo.

S-ro F. Deck, 27 rue Danton, Issy-les-Moulineaux, Seine, Francujo, interŝanĝas neuzitajn poŝtmarkojn kaj bele afrankitajn kovertojn: nepre respondos.

S-ro Romain Chambaz, 44 rue du Haut Pavé, Etampes, S. et O., Francujo: Kiu sendos al mi kino-filmon DUFAYCOLOR, 9 m/m 5, ricevos de mi altvalorajn poŝtmarkojn. Skribu nun.

Deziras interŝanĝi pm. tutmonde, Wha Lung Trading Co., poŝtmarka fako, Room 202 Yu Feng Building, Liao Ning Road, Tientsin, Ĉinujo. Korespondu aerpoŝte.

40-jara fraŭlo (komizo) deziras korespondi kun ĉiuj landoj. S-ro Alvar Nilsson, Box 526, Eskilstuna 2, Svedujo.

Fr. Svačina, Lanžhot, Ĉeĥoslovakujo, koresp. kun tuta mondo pri jenaj temoj: (1) Bredado de senkornaj kaprinoj, laŭ plej moderna metodo. (2) Pri tuta homa vivo de naskiĝo, ne nur ĝis morto.

Filatelistoj el ĉiuj landoj! Ĉu vi estas fervoraj kolek-tantoj? Bonvolu peti informojn pri Madejra Filatela Klubo. Skribu multnombro al prez.: D-ro J. C. Tavares da Silva, Rua do Aljube, 49, Funchal, Madeira..

Tre deziras aĉeti kaj pagos malavare por ekzempleroj de unuaj esperantaj broŝuroj, jaroj 1887 ĝis 1892, Esperantista familio Chomette, 8525 Saturn Street, Los Angeles 35, Calif., Usono.

Apotekistoj! Medikamentojn, boteletojn, kuracajn vegetaĵojn deziras eksporti: Esperanto-Komerca-Servo, 98 rue Casimir-Delavigne, Le Havre, Francujo.

Junulo deziras korespondi kun tuta mondo pri ĉiuj temoj. Certe respondos. Erkki Aulasmaa, Tarulankatu 1, Lappeenranta, Finnlando.

Letervesperon meze de januaro aranĝos gelernantoj de Esp.-kurso, kiuj volonte volus korespondadi ĉiulanden. Skribu tuj kaj multnombro: Esperanto-klubo, Česká Lipa, Ĉeĥoslovakujo.

Kiu sendos al mi 50 poŝtmarkojn de sia lando ricevos la saman kvanton de Svedujo. Respondo garantiata. S-ro Gilbert Nyberg, Järnvägsgatan 8, Skövde, Svedujo.

Senlabora kultura eks-inspektoro departementa en Hungarujo volonte farus kian ajn laboron: aranĝi en hejmo privatajn aŭ oficialajn aferojn por eksterlandaj hungaroj kaj por aliaj gesamideanoj; entrepreni—kiel agento—komercajn mandatojn de fabrikoj aŭ komercaj asocioj, k.t.p. Adreso: S-ro Pál Liszy, Kathy József-u. Székesfehérvár, Hungarujo.

Senpagaj libroj kaj gazetabonoj! La 3a Internacia Muzikfesto (1949) presigas belan programon en Esperanto. Al ĉiu kiu konigas ĝin al sialanda ĥoro aŭ dancistaro ni donas premie esperantan libron aŭ gazetabonon. Apartaj premioj por gravaj kaj belaj salutoj! Informas la Sek-inoj, Ponciau, Wrexham, Britujo.

Pentroartistoj! Desegnu afiŝon por la 3a Internacia Muzikfesto. Valoraj premioj. Informas la Sek-inoj, Ponciau, Wrexham, Britujo.

Angla fraŭlino 22-jara deziras korespondi kun gejunuloj en ĉiuj landoj. Elizabeth Greenhalgh, 448 St. Saviours Road, Leicester, Anglujo.

Motala Esperanto-Klubo festos la 23an de jan. 1949 sian 20an datrevenon. Sendu gratulkartojn el ĉiuj partoj de la mondo. Ni certe respondos. Adresu: Esperanto-Klubo, Carl Hallros, Agneshögsgatan 11, Motala, Svedujo.

Deziras interŝanĝi pm. noveldonitajn kun tutmondo "Pminterŝanĝo", Box 80, Tientsin, Ĉinujo. Korespondu aerpoŝte; respondo garantiata.

Mi deziras korespondi kun vegetaraj esperantistoj en ĉiuj landoj. Bertil Nilsson, Folkskolegatan 4, Stockholm, Svedujo.

Fr. Mercier—Ker St. Gast—42 rue Salengro, Angers, Francujo deziras ricevi salutpoŝtkartojn por siaj gelernantoj. Ĉiam respondos.

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

41a JARA Decembro 1948
N-ro 518 (12)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro :
HANS JAKOB

Helpredaktoro
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj
estas permesataj, kondiĉe ke oni
citu la fonton. Por bibliografia
celo oni sendu periodaĵon en kiu
aperas represo el ESPERANTO,
al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £5 : ½ paĝo 50 ŝil.
¼ paĝo 25 ŝil. : ⅛ paĝo 12.5 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 65 landoj

UNUECO

Ĉiu movado socia aŭ alia sukcesas akceptigi sian idealon nur per senkondiĉa unueco inter la agantoj. Necesas, ke oni ripetu kaj ripetu ĉi tiun elementan veron kaj averti pri la sekvoj de senpripensa agado. Unueco postulas disciplinon, respekton al akceptitaj sindevigoj kaj klaran percepton pri la *por* kaj *kontraŭ*.

Doktoro Zamenhof tuj ekkonis tion. Li krome konis la homan karakteron, radikiĝintan en la naturo, serĉi, ŝanĝi kaj strebi al io pli perfekta. El tiu kono Zamenhof verkis la antaŭparolon al la *Fundamento de Esperanto*, tekston, kiun ĉiu Esperantisto devus koni parkere.

La unueco de nia celado estas triaspekta : lingva, idea, organiza. La ĉefa estas la lingva, sed la ceteraj du estas firme ligitaj al ĝi. La lingva unueco jam plurfoje estas grave minacita sed la Esperantistaro instinkte komprenis la danĝeron de disfalo. La idea unueco kulminas en la vortoj de la himno kaj trovis konkretan esprimon en statutoj de diversaj organizaĵoj, interalie en tiu de U.E.A. La organiza unueco, pri kiu oni batalis dum jardekoj, realiĝis almenaŭ por la senpolitika movado.

Rompi ĉi tiun unuecon pene atingitan ŝajnas hodiaŭ kiel batalo kontraŭ ventmueliloj. Laŭ natura ciklo, tio estas la lingva unueco, kiun oni serĉas rompi. Temas nun pri proponoj (eble bonintence faritaj) modifi la ortografion. Inter la proponantoj estas konata verkisto, kiu per batalkrio invitas akcepti lian proponon. Nenio nova sub la suno, oni povas diri. Laŭ tiu profeto, la ĝenerala akcepto de Esperanto dependas *nur de la ortografio*. Oni povas demandi, kial do aliaj sistemoj, kiuj precize akceptis tian ortografion ne sukcesis ? La proponoj, modifi aŭ reformi tion aŭ alion en nia lingvo, sumis je 88. La nova propono, tiu de samideano Jaime Grau Casas, estas la 89-a ! Ni atendas la momenton, kiam ni povos saluti la centan. Ĝeneraligo de internacia lingvo dependas de aliaj faktoroj, tre malproksimaj de la lingvaj detaloj. Al la dolĉaj melodioj de iuj reformemuloj ni simple kontraŭmetas la klaran averton de Zamenhof :

“Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la *registaroj* de la plej ĉefaj regnoj kaj ĉi tiuj registaroj per speciala *leĝo* garantias al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon kaj plenan sendanĝerecon kontraŭ ĉiuj personaj kapricoj aŭ disputoj, tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝis necesaj ; sed *ĝis tiu tempo* la fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute senŝanĝa, ĉar severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta.”

Konkludo : Ne per nova ortografio venkos nia ideo, sed per la unueco lingva, idea kaj organiza.

H.J.

RIGARDO TRA LA ESPERANTISTA GAZETARO

Gazetaro respegulas la vivon, kaj laŭ ĉi tiu kriterio la movado vivas kaj floras. Rigardo al la ĉefaj periodaĵoj havigas al ni altvalorajn konstatojn.

Sennaciulo, organo de S.A.T. en Oktobro 1948 aperigis protokolaron pri la 21-a kongreso de tiu organizaĵo, okazinta en Amsterdam, kun emfaze proklamita konstato **bonege** sukcesinta. Same kiel U.E.A., ankaŭ S.A.T. baraktas pri la komplikaj aferoj en la montransendo el unu lando en alian. Malgraŭ ĉi tiuj malhelpaĵoj S.A.T. sukcesas eldoni kaj reeldoni altvalorajn verkojn (*Plena Vortaro* kaj *Leteroj de Zamenhof*). Aliaj verkoj estas en preparo.

Pri la rilatoj kun la Lingva Akademio Sennaciulo skribas: "Nenio nova. Ne mirige, ĉar ni scias, ke en tiu instanco la generado estas malofta kaj la gravedo longdaŭra, multe pli longa ol ĉe la speco elefanto. Ni esperu, ke la idoj estos belaj kaj bonfartaj, sed certe en la plano de reorganizado S.A.T. ne plu estos ignorata kiel ĝis 1940".

Kaj pri kunlaboro kun U.E.A.:

"Ni volonte ekzamenos kun U.E.A. ĉian projekton kiu celas restarigi la Lingvan Komitaton sur bazo pli moderna kaj pli efika. Sed tute ne utilas konsideri projekton, kiu celas kunlaboron sur alia tereno de du movadoj, kies celoj estas profunde malsamaj (la neŭtrala: disvastigado de Esperanto en ĉiuj medioj kun tre ofte akcentita dandismo, flirtemo, kolektismo; la nia: klerigado, edukado, uzo de Esperanto, servo de la laborista klaso)."

Heroldo de Esperanto, 16 Oktobro en artikolo *Iom pri ni mem* informas pri sciindaj detaloj el la redakcio de esperantista periodaĵo. La nombro de la regulaj abonantoj atingis ĝis Septembro 2111 (el kiuj 1874 efektive pagis la abonon). La eldonnombro estas 2400 ekzempleroj.

Pri alia detalo spertata de ĉiuj redaktoroj de periodaĵoj, kaj ne nur de esperantista:

"Ni tre ŝatas korespondi kaj ankaŭ tre ŝatas fari komplezojn, plenumi la diversspecajn dezirojn kaj petojn, kiajn povas elpensi iu samideano. Sed se ni jam devas silente rifuzi, tio devenas de la fakto, ke ni—unu sola homo—simple ne posedas la fizikan eblon krom la redakciaj, administraj kaj multspecaj aliaj laboroj, ankoraŭ informi pri ĉiaj aferoj, eĉ tiaj kiuj ne rilatas nian entreprenon."

La Praktiko, Julio-Septembro formas belan kajeron de 24 paĝoj, rice ilustritan kaj kun tre

diversa teksto. La numero enhavas raportojn pri la Universala Kongreso de Esperanto, la S.A.T.-Kongreso kaj pri la porpacaj kunvenoj organizitaj de Universala Ligo. Leginda artikolo pri la Sankta Monto de Hispanujo, la Montserrat, kaj alia pri la lasta ekspedicio de Byrd al la suda poluso.

La Espero, sveda Esperanto-gazeto, Septembro-Oktobro, dika kajero de 36 paĝoj estas dediĉata al la granda okazaĵo nunjara: la 33-a U.K. en Malmö. Multaj fotografaĵoj ornamas ĉi tiun belegan numeron, kiun cetere ricevis ĉiu kongresano, kiel memoraĵon. La sama numero enhavas priskribon pri la tridekjara agado de Eldona Societo Esperanto en Stockholm kun fotoj de la simpatiaj kunlaborantoj de ĉi tiu entrepreno: Halldor, Larsson, Pehrsson, Eriksson, kaj la nuna estraro. Dum ĉi tiu epoko 1918-1948 ĉi tiu eldonejo vendis ne malpli ol **kvincent mil** librojn el la propra eldonejo, kiel pruvas sistema statistiko. Kaj la raporto finiĝas per la atentindaj vortoj: "Subtenu la esperantistajn eldonejojn per aĉeto de Esperanta literaturo."

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Arcamone. Al Ges-roj A. Arcamone en Batna, Alĝerio, je la 31a de Aŭgusto naskiĝis filino, Eliane.

MacGill. Al Ges-roj D. MacGill en Pinehaven, Nov-Zelando, je la 5a de Oktobro naskiĝis filo, Stephen Clive.

Niaj Mortintoj

Ni sciigis pri la forpaso de la jenaj samideanoj. Al iliaj familianoj ni esprimas nian profundan kondolencon.

S-ino Armleder, 86 jaraĝa, edzino de la bone konata hotelestro en Genevo, en Oktobro 1948. De angla deveno S-ino Armleder lernis Esperanton kaj partoprenis diversajn kongresojn. Membrino multjara de UEA.

Hilda Hansson, Malmö, Svedujo. Instruistino pensiita, sindona membrino de la loka grupo kaj UEA, 3a de Aŭgusto 1948.

Karsch, Johannes. Nur nun ni sciigis ke Johannes Karsch, filo de la estinta vicprezidanto de UEA, mortis en sovjeta kaptiteco pasintjare. Instruisto, li devis forlasi tiun ĉi oficon okaze de la ekiĝo de la Tria Regno, ĉar li estis kontraŭulo de la reĝimo. Ano kaj delegito de UEA dum pluraj jaroj en Oberfriedersdorf, Saksujo.

Emil Lundquist, sveda fervojisto, Lulea, 55 jaraĝa. Estinta prezidanto de la loka grupo, delegito de UEA, fervora laboranto por nia afero, forpasis 28an de Julio 1948. Lian dankon al Esperanto li esprimis per donaco testamenta de kvincent kronoj al Sveda Federacio kun la jenaj vortoj: "Dankdonaceto pro la tempo kiam mia edzino kuŝis malsana kaj Esperanto donis al mi konsolon neforgeseblan."

15-a DE DECEMBRO

Pensoj de ĉiama fervorulo

Dato plej kara al ni Esperantistoj estas ĉi tiu, 15-a de Decembro, sekvata dek tagojn poste de alia festotago tre kara al la granda plimulto inter ni, la kristana. Je la 15-a de Decembro, aŭ dum ĉi tiu semajno, kunvenas en la vasta mondo la adeptoj de **la sola kaj efektiva Lingvo Internacia, Esperanto**, ĉi tiu produktaĵo de homo modesta, kiu ĉiam atentigis, ke li ne estis kreinto, sed iniciatinto, la vojfaranto.

Ĉu ne estas miriga fakto, kiun iam esploru psikanalizistoj, ke miloj kaj miloj da homoj

entuziasmiĝas pri lingvo, kiu havas nek difinitan patrolandon, nek regnon, sed vivas nur danke al la krea genio homa? Ja estas tio, kio instigis iujn diktatorojn nuligi nian movadon, kies ideo estis al ili funde malsimpatia. Ke Esperanto povis arigi entuziasmajn homojn, ke ĝi povis rezisti al tiom da obstakloj, ke ĝi kapablis krei ion, kion ni iom troige nomas *popolo*, tio estas realaĵoj neforigeblaj. Ni ne sufiĉe priatentas ĉi tiun fenomenon de krea povo, kiu eliras de nia lingvo.

Al nia Majstro

Pacema familia rondo
Vivanta sen malam', milit',
En harmonia, bela mondo,
Jen la deziro de spirit'
De hom' genia, grandanima :
Vi, Kara Majstro portis ĝin.
El loko eta vok' translima
Eksonis, kaj ni aŭdis vin.

Ideo nobla nin ĝojigis :
La lingvo kaj homara am' !
Ekstere nin la lingvo ligis,
Interne varma ĝojoflam'.
Jardekoj intertempe pasis.
Korp' via kuŝas en la ĉerk'.
Se ankaŭ tiu nin forlasis,
Eterne vivos via verk' !

Kreskadas via amikaro
Al vi dankanta pro donac !
De vi kreita por bonfaro :
Por frata amo kaj por pac' !

Friedrich Hahn, Bremen

Estas do ĝuste kaj juste, ke ni memoru ĉi tiun tagon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, kaj estas bela signo de dankemo, ke reunuiĝas je ĉi tiu dato la esperantistoj en la tuta mondo. Estis antaŭ 70 jaroj, ke la juna Zamenhof konigis la primitivan formon de sia kreaĵo al kungimnazi-anoj kaj oni por la unua fojo balbutis ĉi tiun idiomon. Kiom da anima forto kaj firma konvinko havis ĉi tiu homo por spiti ĉiujn mal-

helpojn kiuj staris kontraŭ li. Precize en tio kuŝas lia vera grandeco : elteni kaj persisti.

Li ne vidis la venkon de sia ideo. Same kiel Mozeo ne rajtis vidi la benatan teron, ankaŭ Zamenhof povis nur ĵeti rigardon en la supozatan estontecon. Ĉi tiu ekzempla firmeco de konvinko pri ideo helpis lin en malfacilaj momentoj de la vivo. Ni tion memoru je la 15-a de Decembro kaj ni lernu el ĝi.

ESPERANTISMAJ PROBLEMOJ

VI.—La Esperantista gazetaro

Problemo, kiu ĉiam revenas kaj neniam estos solvata je ĝenerala kontento, estas tiu de la gazetaro Esperantista; pli malvaste, tiu de la *unika, ĝenerala, universala* periodaĵo. Diversaj kritikoj aŭditaj en la lasta tempo invitas ree diskuti ĉi tiun *problemon* antaŭ pli vasta publiko. Dum la kongreso en Malmö la decidantaj povoj de U.E.A. diskutis diversajn proponojn kaj komisiono tiucele starigita ekzamenis kaj faris diversajn sugestojn. La diskutobjekto estas proksimume ĉi tiu: Ĉu estas eble laŭ la nunaj cirkonstancoj efektivi la dezirojn krei imponan, ĝeneralan, ilustritan (aldonu pliajn adjektivojn laŭplaĉe!) periodaĵon esperantistan. Tiu periodaĵo enhavu proksimume tion, kion enhavas tri ĉefaj periodaĵoj nunaj. Plia deziro estas, ke ĉi tiu periodaĵo estu malmultekosta. Preskaŭ 40-jara sperto en ĉi tiu fako, akirita sub diversaj kondiĉoj, rajtigas min tranĉi ĉi tiun *problemon*, sed ne solvi laŭ la ĉi-supraj deziroj. Necesas iom reveni en la estintecon por pli bone kompreni la estantecon.

La estinteco

Kiu ekzamenas hodiaŭ, 34 jarojn post la eksplodo de la unua mondmilito, la gazetaron esperantistan, nete konstatas, kiom tranĉe influis tiu katastrofo nian aferon. Konsiderante nur la internaciajn periodaĵojn, ni malĝoje vidas kiom ne perdis. Aperis tiam *La Revuo, Lingvo Internacia, Internacia Scienca Revuo* por citi nur tri tipajn. *Esperanto* de U.E.A. aperis dufoje ĉiumonate kun minimume 22 numeroj en jaro kaj kun 382 paĝoj en la jaro (1913). Krom tio ekzistis aro da periodaĵoj nacilingvaj, el kiuj kelkaj altiris legantojn eĉ en aliaj landoj, ekzemple *Ondo de Esperanto, Le Monde Espérantiste*; kaj por kroni ĉion ekzistis *Oficiala Gazeto* aperanta en Parizo, kiu informis pri la laboroj de la oficialaj institucioj tiamaj (Lingva Komitato, Kongresa Komitato, Centra Oficejo Esperantista en Parizo k.s.).

La situacio ŝanĝiĝis post la unua mondmilito. La cititaj periodaĵoj ne reaperis. *Esperanto* de U.E.A. persistis dum la tuta milito. La kreo de ĉiusemajna gazeto grandformata *Esperanto Triumfonta*, la nuna *Heroldo de Esperanto*, iagrade kompensis de gazetara vidpunkto la malaperon de la aliaj. Ĝin kompletigis de beletra vidpunkto *Literatura Mondo*. Ĉio kredigis, ke iom post iom oni povus ree atingi la staton de antaŭ 1914, tiom laŭ kvanto, kiom laŭ kvalito.

La konstatojn kaj konkludojn de la estinteco (de 1910 ĝis 1939) ni povas resumi jene:

1. La **abonpovo** de la esperantista publiko estas limigita. *Esperanto* de U.E.A. estis la sola periodaĵo, kiu povis presigi dum certa tempo pli ol dekmil ekzemplerojn. Meza eldonnombro de esperantista periodaĵo internacia troviĝis inter 2000 kaj 3000 ekzempleroj, kio ankoraŭ ne signifas pagintajn abonantojn.

2. La **abonebleco** de internacia periodaĵo esperantista dependis post 1919 grandparte de la valuto-kondiĉoj en Eŭropo, pli ĝuste esprimitaj de la salajro-nivelo en ĉiuj landoj. Tio devigis ekzemple U.E.A. krei sistemon de kotizoj en koncernaj valutoj, kiuj estis sub la normala prezo en svisaj frankoj. Parta egaligo de ĉi tiu perdo okazis per la presigo en landoj kun prezoj sub la internacia normo, kio tamen ekstreme komplikis redaktadon kaj administradon.

3. La **abonemo** de la esperantista publiko ne respondis al la penado de aro da bonvolaj kaj monhavaj eldonintoj plus redaktoroj. Tiun fakton multaj kritikantoj bonintence ignoras.

Ni kompletigu la ĉi-suprajn liniojn per la lasta konstato, ke neniuj periodaĵoj ekzistinta povis vivi normale, t.e. pagi redaktoron el enspezoj regulaj. Ne estas sekreto, ke tio estas la sorto de multaj nacilingvaj periodaĵoj ne-esperantistaj kun aparta karaktero.

La estanteco

La situacio post la dua mondmilito estas entute alia ol tiu post 1918. La detruo de 1914–1918 estis alispeca; ĝi ne atingis la substancon. Pri la ideo ŝanĝo ni parolos aliloke, ĉar tiun fenomenon oni ne sufiĉe atentis en la prijuĝo pri la nuna situacio de nia movado.

La unuecigo de la neŭtrala movado iagrade simpligis la problemon de la oficiala periodaĵo esperantista. Sed la nuna stato ne estas kontentiga. Oni sentas ian mankon. Tiun mankon oni ne povas forigi per la nunaj financaj rimedoj. La eksperimenton de U.E.A. inter 1919–1928 oni ne povas ripeti, ĉar la elementoj ne plu ekzistas. Ekzemple, presigi en lando kun *malalta* valuto kompare kun la angla kaj svisa ne plu estas permesata. La sistemo de pago internacia ne plu rajtigas uzi enspezojn de unu lando (kun malalta nivelo interna) por fari mendojn. Necesas konigi tiun tre konatan veron, ĉar iuj personoj evidente ne scias tion. Krome, ne ekzistas kapitalo kiu povus egaligi perdojn.

La tipo de riĉa samideano eldonanta je sia risko esperantistan periodaĵon ne plu ekzistas. Oni devas esti jam kontenta trovi redaktoron libervole sin okupanta pri la ĉefaj redakciaj laboroj.

Resumante ĉion pri la nuna situacio, ni diru, ke la dua milito detruis la substancon de nia agado. Ĝi ne tuŝis la kernon de nia ideo, tute ne. Tiun substancon ni vidas en la facileco de la internaciaj rilatoj, la egaleco proksimuma de la vivnivelo, kaj ne forgesinde . . . trankvila situacio politika. Jam unu el tiuj elementoj sufiĉas por faligi plej zorge ellaboritajn planojn kaj budĝetojn. La konkludo de ĉio tio estas, ke oni ne postulu ion neeban. Ni estu realecaj !

La estonteco

La estonteco de nia gazetaro dependas esence de la ekonomiaj kaj politikaj kondiĉoj tutmondaj. La politika malfacileco malpermesas efektivi iujn dezirojn. Por la venonta jaro la Estraro de U.E.A. antaŭvidis iujn internajn ŝanĝojn kaj plibonigojn de *Esperanto*, supoze ke ne intervenos okazaĵoj kiuj grave influos nian agadon entute. Profeti hodiaŭ kia estos la estonteco estus ridinde. Kion ni povas diri kun certa estas, ke ni provos aperigi *Esperanto* de U.E.A. eĉ se nova kunflago ĵetos la mondon en fajron kaj sangon.

Ĉion konsiderinte, ni ne havas eĉ rajton por plendo. Post tiom da katastrofoj falintaj sur nian movadon precize en tiuj landoj, kie ĝi estis plej bone establita, ni devas esti kontentaj pri la videblaj sukcesoj de la rekonstruo.

H.J.

EN KELKAJ LINIOJ

Edgar de Wahl mortis. Laŭ gazetinformoj mortis dum Oktobro 1948 en la urbo Tallinn, Estonujo, atinginte 81 jarojn, la aŭtoro de *Occidental* internacia lingvo, projekto aperinta post la unua mondmilito.

* * *

Edition Peters en Usono. Ĉiu muzikamanto konas la *Edition Peters* de la klasikuloj de la muziko, entreprenon starigita jam en 1800. Ĉi tiu eldono reaperos en Novjorko sub la gvido de Walter Hinrichsen, ĝis lastatempe estro de la muzikaferoj de la usona registaro militista en Germanujo. La oficejo troviĝos en la *Carnegie Hall* en Novjorko.

* * *

Sango el sukero. Britaj sciencistoj trovis artan sangoplasmon, kiu espereble povos anstataŭi veran sangon, almenaŭ parte, en transfuzioj. Ĉi tiu eltrovo devus esti altvalora precipe en la tropikoj. La nova plasmato estas ekstraktata el betsukero kaj ĝi montriĝis efika en ĉiuj ĝis nun faritaj provoj en la laboratorio. Oni ricevis ĉi tiun plasmon danke al la kemiistoj de la *East Anglia Chemical Co.* en Aycliffe apud Darlington kaj al evoluigo en la Universitato Birmingham. La serĉado al ĉi tia plasmato daŭris jarojn sed

ĉiuj ĝis nun kreitaj preparaĵoj havis nebonan efikon sur la homan organismon. La nova plasmato, laŭ la deklaro de Prof. Stacey de la Universitato Birmingham, estas en tiu rilato ekster riproĉo.

* * *

Brita ekspedicio al la Antarkto. Dum la pasinta monato forlasis la havenon Southampton la ŝipo *John Biscoe*. Inter la personaro troviĝas tri meteorologoj, eksperto pri glacio, kinisto kaj ĵurnalisto. La ekspedicio restos 18 monatojn en la Antarkto. Ĝi faros mezurojn kaj anstataŭos alian ekspedicion en la Marine Darbel Golfo. Ĉi tiu nova ekspedicio intencas iri pli suden kaj starigos bazejon ĉe la okcidenta bordo de la Alexander I—lando, kie ĝis nun neniu ekspedicio estas restinta. La eksperto pri glacio studos la moviĝojn de la glacio por difini la veterkondiĉojn por pli longa tempo. En la regiono de la Marine Darbel Golfo oni esperas trovi kupron, karbon kaj petrolon. Oni ankaŭ intencas ekzameni la ekspluateblojn de la eventuale tie troviĝantaj mineraloj. La estro de la ekspedicio estas Majoro K. S. Pierce Butler.

* * *

Greta Garbo—George Sand. Post 1925 Greta Garbo faris neniun novan filmon. Ŝia lasta filmo estis *La senĝoja strato*. Ni ricevis informon, ke la granda artistino denove faros prezenton en la rolo de la franca verkistino George Sand. Oni samtempe faros franclingvan prototipon de la filmo.

* * *

Rezervejo por kastoroj. La kanada registaro decidis starigi ok rezervejojn ampleksantajn ne malpli ol 200.000 kv.km. por la kastoro. La zorgado pri ili estas konfidata al indianoj. La rezervejoj servos samtempe kiel peltofarmoj, kaj tri el ili jam plene funkcias. La indianfamilioj, ĉirkaŭ 150, perlaboras ĉiujare po unu milo da dolaroj. Por esprimi dankon al la ministro por best- kaj fiŝĉasado, S-ro L. A. Richmond, pro lia iniciato, la indianoj nomis lin *Blanka Ĉefkastoro* kaj sendis al li honoran dokumenton, kun indiĝena skribo de la *Kri*-indianoj, konsistantan el haŭto de boaco.

* * *

Muzikfondaĵo. La usona sekcio de la *International Society for Contemporary Music* (Int. Soc. por Nuntempa Muziko) decidis krei fondaĵon de 100.000 dolaroj favore al eŭropaj komponistoj kaj iliaj kreaĵoj. La disdonado de la rimedoj okazos per la Pariza Centro de UNESCO kaj oni tiamaniere apogos eŭropajn projektojn ĝis 50%. En la honora prezidanteco partoprenas interalie Serge Kusevicki, Aron Copland kaj Howard Hanson.

Brendon Clark :

MI NE LEGAS LA POEZION !

Tiel skribis al mi iama korespondanto ; kaj por senkulpigi sin li aldonis : “Mi ne komprenas ĝin.” Nu, tio ne estas krimo ; kaj mi ne miras, se iuj ne komprenas la singulteman dialekton kiu naskiĝas el trouzo de elizio kaj neologismoj. Tamen al ĉiu kiu ne ŝatas la veran poezion, nepre mankas unu el la maturaj ĝuoj de la vivo.

Plej kredeble, la ĉefa kauzo de neŝato al la poezio troviĝas en tio, ke la leganto ofte ne scias kion serĉi. Poemo ne estas vortludo ; ĝi ne estas nura ordigo de vortoj laŭ metriko kaj rimo. Verdire, la plej nobla poezio ofte estas tute senrima, kaj vi eble miras, kiam mi mencias, ke la senrima poezio estas la plej malfacile verkeble. Kion do serĉi ? Mi povas respondi per du vortoj : *pensigajn ideojn*. Ideoj estas la bazo, la esenco, de ĉiu kaj ĉia poemo. Sen atentinda ideo poemo ne estas poezio, sed ja fariĝas nura vortludo.

Mi iom klarigu. Se mi skribas :

Brasiko estas nur legomo
Kiu kreskas apud domo

tio ne estas poezio. Ĝi, estas ritma, jes, kaj ĝi rimas, certe ; sed ĝi diras nenion atentindan. Tamen, se mi skribas :

Brasiko estas verda rozo

jen estas ideo ! Mi konfesas, ke ĝi estas nur tre humila ideo, sed ĝi almenaŭ kaŭzas, ke la leganto iom haltu por konsideri ĝin ; ke li diru en si : “Ha jes ! en tio estas semo de vero.” Kaj povas esti, ke ĉiam poste tiu leganto, vidante la pleban brasikon, ekpensos : Verda rozo ! Kaj li rigardos la legomon kun des pli da intereso, eĉ amuzo.

Mallongaj poemoj, ĝenerale, dediĉas sian tutan povon al la esprimo de unu sola ideo. Oni povas taksu la valoron de tia poemo per du demandoj : *Kio estas la ideo kaj kiom ĝi valoras ? kaj Ĉu oni povus pli bele aŭ pli trafe esprimi tiun ideon ?* Jen ĉio, la ideo kaj la perfekteco de ĝia esprimiĝo.

La plej populara formo de la poezio sendube estas la ampoemo, ĉar tiu tuŝas la vivon de preskaŭ ĉiuj ; sed eĉ la ampoemo bezonas novajn ideojn por meriti publikigon. Se oni skribas, ke la lipoj de la amatino similas al rozo, kaj ke ŝiaj okuloj estas bluaj kiel la ĉielo, tio eble plaĉos al la amatino, ĉar la penso rilatas al ŝi mem ; sed ĝi ne tuŝos la koron de la redaktoro. Ties antaŭuloj jam dum jarmiloj enkorbigis amason de tiaj !

Jen estas penso el ampoemo de la persa poeto Hafiz (trad. W. Lippmann) :

Kiam krevos mia kor' varmega
kaj disfalos en mil etajn pecojn,
tiam vi ekkonos, amatinó,
ke el tiuj mil pecetoj ĉiu
amos kiel mil tutsanaj koroj.

Kaj pardonu, se mi citas el *Kontrastoj* :

Ĉar viaj okuloj briladas pro amo,
Feliĉo sufiĉas al vi por ornamo.

Rimarku, ke ideoj estas internacie kompreneblaj. Nur la lingvo povas resti nacia. Mi ne scias, kiuj poemoj aperas en ĉi tiu numero de nia gazeto, sed mi invitas, ke vi tralegu ilin pro trovi la ideojn kaj juĝi pri la lingvo. Kompreneble, mi uzas la vorton *ideo* laŭ tre larĝa senco. Ĉe priskribaj versoj la ideo eble konsistas nur el trafa elekto de detaloj, sed tiuj detaloj devas allogi vian atenton per siaj taŭgeco kaj vero. Ili devas krei tutan bildon aŭ karakteron per kelkaj vortoj. Ekzemple :

Eknoktiĝis, kaj noktuo
flugis el la arbotruo,
kriis per funebraj voko
inter la mallumaj rokoj.

Mencianta la noktuon, Lucien Thévenin elektis ĝuste tion, kio plej forte emfazas la misteran atmosferon de la nokto.

La poet' similas
iam al monaĥ'
kiu, *malgraŭ multaj*
ho kaj multaj aĥ
skizas sanktan libron.

(*La Poeto*, Karolo Piĉ)

La kursivaj vortoj elvokas tre klaran figuron pri la monaĥo, ĉu ne ?

La longaj poemoj ĝenerale traktas pri ia nobla temo, pri heroa okazaĵo aŭ pli profunda filozofio ; sed se ili estas en la plej alta rango de la poezio, ili prezentas en preskaŭ ĉiu verso aŭ versaro atentindan penson, figuron aŭ esprimajon. Ekzemple en la longa poemo *Kanto de la Sonorilo* la germana poeto Schiller priskribas la grandan sonorilon per la vortoj :

Ŝvebanta najbarulo de la tondro.

Nur pripensu tion ! Impona ideo, ĉu ne ?

Pri la pardonemo Shakespeare skribis :

. . . Ĝi dufoje benas : tiun
Kiu montras ĝin, kaj tiun, kiu ĝin ricevas ;
Plej ĝi estas forta ĉe fortuloj ; al monarĥo
Surtronanta, ĝi konvenas pli ol ties krono . . .

Jen tri aparte pripensindaj ideoj en iom pli ol tri versoj. Rimarku, ke la poezio de Shakespeare estas preskaŭ senrima.

Ĉu vi iam vidis kinejfilmon, kies malbonaĵojn oni penis kaŝi per *teknikoloro* ? Simile la pseŭdopoetoj ofte kaŝas sian ideomankon per sonoraj rimoj. Tio ne diras, ke rima poemo estas ĉiam senidea. Tute kontraŭe. Ĉe la mallongaj poemoj, kiam la ideo estas unu sola, la rimo fariĝas akompananta muziko.

Ĉe la longaj poemoj la afero estas alia. Ĝuste kiel la rimoj povas logi la atenton for de la ideomanko, tiel same ili povas logi ĝin for de la ideoriĉo. Kiam vera poeto decidas verki longan poemon, tio estas nur pro tio, ke li havas pli multe da ideoj ol li povas esprimi per mallonga poemo. Ofte li ne volas, ke rimoj forlogu la ŝaton de la leganto for de tiuj ideoj, kaj ankaŭ la klera leganto ne volas tion.

Nun vi eble komprenas, kial senrima poezio estas malfacile verkebla. Sen ideoj ĝi estas nenio. La poeto ne povas kaŝi la vantecon per belsonaj rimoj. Ĉiu verso, de la komenco ĝis la fino, devas kontribui al la perfekta esprimo de esenca ideo. Per unu vorto, ĝi devas esti pura poezio.

Piramida kanto

de Juno Kailas

Faraonoj, vi, kies sonĝo
piramidojn imagis ĉe Nil',
salutataj estu nun vi
trans jaroj mil kaj mil.

Trans morton avidepreneman
kun celo al la senlim',
vi efektivigis la sonĝon,
piramidon de via anim'.

Salutataj estu nun vi
trans la jaroj mil kaj cent.
Ekstaros la piramidoj
dum vivos homa la gent'.

Laŭ sia mezuro ĉiu
piramidon estigas pli.
Kaj en la interna kavo
jam baldaŭ dormos ni

silente laŭ faraonoj,
kiel raŭpo en la kokon'.
Piramido staradas, vidatas,
faraonon kaŝos nekon'.

Vilho Setälä tradukis

LA VIRETO EN NUR ĈEMIZO

En sonĝo la homoj ofte aperas en publikaj lokoj kun nur ĉemizo. Ĉu eble ĉi tio ankaŭ estas sonĝo ?

Juĝisto : Kion la akuzito diras por sin defendi ?

Vireto (kun nur ĉemizo) : Mi ja ne estas akuzito !

Juĝisto : Vere ? Kio do vi kredas vin ?

Vireto : Mi ja estas akuzanto ! Min atakis sur strato dek grandaj viroj. Min malbontraktis. Ĉion forrabis. Nur ĉemizo restas.

Juĝisto : Nu, bone. Vi do konfesas vian krimon.

Vireto : Dio helpu ! Mi ja estas viktimo de krimo. Ne povas esti krimo fariĝi viktimo de krimo !

Juĝisto : Vi malsaĝulo ! Kompreneble, krimo ! La nova mondordo leĝdonas, ke la pli granda kaj pli forta ĉiam estas prava, la etulo malprava. Ĉu vi eble pretendas, ke vi estas pli granda kaj pli forta ol dek grandaj, fortaj viroj ? Ĉu ?

Vireto : Ne, sed

Juĝisto : Fermu do vian buŝon ! La procedo estas klara. Vi mem konfesis. Vi estas viktimo de kruda malbontrakto kaj rabo. Tio sekvigas al vi rigoran punon.

Vireto : Sed mi ja ne propravole falis en tiun malbonsorton . . .

Juĝisto : Ho, eble vi volas kontraŭdiri ! Tio plimalbonigas vian aferon. Tre malbonigas. Kaj precipe gravega estas la cirkonstanco, ke viaj atakantoj estis tiom multenombraj. Kaj grandaj. Kaj fortaj. Tre grava afero. Mi kondamnas vin al vivdaŭra punlaboro.

Vireto : Helpon !

Juĝisto : Kion mi aŭdas ? Eble vi, kiam vi estis prirabata, eĉ alvokis helpon ?

Vireto : Kompreneble.

Juĝisto : Tio ankoraŭ mankis. Kvankam vi estas tiom malgranda kaj malforta ! Kulmino de aroganteco ! Vi havos krom la vivdaŭro ankoraŭ kvin jarojn.

Vireto : Tio estas neeblo ! Mi postulas justecon ! Justecon !

Juĝisto : Justecon . . . hahahahaha . . . nu nu haha . . . kaj vi kuraĝas ankoraŭ nekonvene ridigi la juĝistaron ! Vi havos ankoraŭ kvin jarojn. Dek jarojn super la vivdaŭra puno !

Olli

Selma Lagerlöf :

INTER LA GRIMPANTAJ ROZOJ

Mi dezirus, ke tiuj homoj, inter kiuj mi travivis mian someron, faligu siajn rigardojn sur ĉi tiujn liniojn. Nun post kiam venis malvarmo kaj malhelaj noktoj, mi volus rekonduki iliajn pensojn al la hela, varma sezono.

Antaŭ ĉio mi volus rememorigi ilin pri la grim pantaj rozoj, kiuj ĉirkaŭis la verandon, pri la delikata, iom maldensa foliaro de *Rosa Bengalensis*, kiu tiel en sunbrilo kiel lunlumo desegniĝis per malhelgriza ombro sur la helgriza ŝtona planko kaj ĵetis malpezan puntovualon sur ĉion ekstere, kaj pri ĝiaj grandaj, helaj floregoj kun la disŝiritaj randoj.

Aliaj someroj rememorigas al mi trifoliejojn aŭ betularojn aŭ astrakanpomojn kaj berarbetaĵojn, sed ĉi tiu somero ricevis sian karakteron de la grim pantaj rozoj. La helaj delikataj burĝonoj, kiuj toleris nek venton nek pluvon, la facile balanciĝantaj, helverdaj branĉidoj unujaraj, la mole kliniĝintaj trunkoj, la superabunda riĉeco de floroj, la gaje zumantaj aroj de l' insektoj, ĉio ĉi sekvos min kaj releviĝos antaŭ mi en sia tuta pompo, kiam miaj pensoj reiras al la somero, la serena, bela, delikata somero.

Nun, kiam venis la tempo de laboro, oni ofte demandas min, kiel mi pasigis mian someron. Tiam ĉio alia forglitas el mia memoro, kaj ŝajnas al mi, kvazaŭ mi sidadis tagon post tago sur la verando malantaŭ la grim pantaj rozoj kaj ensorbadis odoron kaj sunlumon. Kion mi do faris? Ho, mi rigardis kiel aliaj laboris.

Tie estis malgranda tapetist-abelo,* kiu laboradis de mateno ĝis vespero, de mateno ĝis vespero. El la molaj, verdaj foli platoj ĝi elsegis per siaj akraj makzeloj malgrandan, belaspektan ovalon, kunvolvis ĝin tiel kiel oni kunvolvas efektivan tapeton, kaj kun la kara ŝarĝo premita al sia korpo ĝi forflirtis al la parko kaj sidiĝis sur malnovan arbostumpon. Tie ĝi profundigis en mallumajn irejojn kaj misterajn galeriojn, ĝis fine ĝi atingis la fundon de vertikala ŝakto. En ĝia nekonata profundaĵo, kien nek formiko nek miriapodo iam kuraĝis penetri, ĝi sternis la verdan folivolvaĵon kaj tegis la malebenan plankon per plej bela tapiŝo. Kaj kiam la planko estis tegita, la abelo revenis preni novajn foli platojn por tegi la murojn de l' ŝakto kaj laboris tiel rapide kaj fervore, ke baldaŭ ne troviĝis unu folio en la rozospaliro, kiu ne havis ovalan eltranĉon, atestantan ke ĝi devis kontribui al la ornamado de la malnova arbostumpo.

* Speco de abelo megakilo, *Megachile centuncularis*.

Iun belan tagon la eta abelo ŝanĝis laboron. Ĝi boris sin profunden inter la implikiĝintaj folioj de la gigantaj rozoj, suĉis kaj trinkis kiom ĝi nur kapablis en ĉi tiuj belaj provizejoj, kaj kiam ĝi ricevis unu buŝplenon, ĝi tuj forflugis al la malnova arbostumpo por plenigi la ĵustapetitan ĉambron per plej klara mielo.

Sed la malgranda abelo ne estis la sola, kiu laboris tie en la rozospaliro. Tie ankaŭ troviĝis araneo, tute senegala araneo. Ĝi estis pli granda ol iaspeca araneo, kian mi iam vidis, ĝi estis hele flavruĝa kun klare punktita kruco sur la dorso, kaj ĝi havis ok longajn, ruĝ- kaj blank-striajn kurojn, ĉiujn egale bone desegnitajn. Vi nur devus vidi ĝin ŝpini! Ĉiu fadeno estis tirata kun la plej ekstrema precizeco, tuj de la unuaj, kiuj estis nur por apogo kaj fiksado, ĝis la plej internaj, delikataj teksfadenoj. Kaj vi devus esti vidintaj ĝin ekvilibre sin movi antaŭen laŭ la maldikaj fadenoj por kapti muŝon aŭ por okupi sian tronon en la mezo de la reto, senmova, pacienca, atendanta plurajn horojn.

Ĉi tiu granda flavruĝa araneo gajnis mian koron: ĝi estis tre pacienca kaj tre saĝa. Ĉiutage ĝi havis sian bataleton kun la abelo, kaj ĉiam ĝi sin eltiris el la afero kun la sama nemankanta takto. La abelo, kiu havis sian vojon dense preter la araneo, fojon post fojo kaptiĝis en ĝia reto. Tuj la abelo komencis zumi kaj ŝiri, ĝi taŭzis la delikatan reton kaj kondutis kiel frenezulo, kio kompreneble nur havis tiun sekvon, ke ĝi ankoraŭ pli forte kaptiĝis kaj ke tiel kruroj kiel flugiloj estis envolvitaj en la glueca teksaĵo.

Tuj kiam la abelo estis ellacigita kaj paralizita, la araneo elrampis. Ĝi ĉiam tenis sin je deca distanco, sed per la plej ekstrema pinto de unu el la elegantaj ruĝstria kruroj ĝi donis al la abelo puŝeton, tiel ke ĝi turniĝis en la teksaĵo. Kaj post kiam la abelo ree zumis kaj ĝislace furiozis, ĝi denove ricevis unu plej mildan puŝeton kaj poste ankoraŭ unu kaj ankoraŭ unu, ĝis ĝi turniĝadis kiel turbo kaj jam ne estis konscia en sia furiozo kaj tiel konfuziĝis ke ĝi ne povis sin defendi. Sed dum ĉi tiu turniĝado ĉiam pli kuntordiĝis la fadenoj, kiuj tenis ĝin kaptita, kaj la streĉeco fariĝis tiel granda, ke ili rompiĝis, kaj la abelo falis teren. Jes, ĝuste tion kompreneble volis la araneo.

Kaj ĉi tiun artaĵon ili povis refaradi, ĉi tiuj du, tagon post tago, tiel longe kiel la abelo havis laboron en la rozospaliro. Neniam la malgranda tapetisto povis lerni gardi sin de la aranea reto,

kaj neniam la araneo montris koleron aŭ malpaciencon. Efektive mi amis ilin ambaŭ, la malgrandan, fervoran, vilan laboriston same kiel la grandan, ruzan maljunan ĉasiston.

Grandaj okazaĵoj ne ofte havis lokon en la korto kun la grim pantaj rozoj. Tra la spaliro oni povis vidi la malgrandan lagon, palpebrumantan kontraŭ la suno. Kaj tio estis lago, tro malgranda kaj tro ĉirkaŭŝirmita por povi sin levi kun efektivaj ondoj, sed je ĉiu eta krispiĝo sur la griza supraĵo disflugis miloj da fajreretoj, kiuj briletis kaj ludis sur la ondoj: tio estis kvazaŭ la tuta profundo estus plena je fajro, kiu ne povis elliberiĝi. Kaj tia estis la somera vivo tie: ĝi kutime estis tre kvieta, sed se nur venis la plej eta krispiĝo—ho, kiel ĝi povis lumvibri kaj briletadi!

Kaj grandaj aferoj ne estis bezonataj por nin ĝojigi. Floro aŭ birdo povis doni al ni gajecon por pluraj horoj, por ne mencii la tapetistabelon. Neniam mi forgesos kiel kore ĝoja mi foje estis pri ĝi.

La abelo estis en la aranea reto kiel kutime, kaj la araneo kiel kutime helpis ĝin elliberiĝi, sed ĝi estis firme kaptita, tiel ke ĝi devis treege longe turniĝadi kaj estis tre kvieta kaj subigita, kiam ĝi forflugis. Mi klinis min antaŭen por vidi, ĉu la aranea teksaĵo estas grave difektita. Nu, feliĉe ne, tamen jen malgranda flava larvo sidis kaptita en la reto, malgranda fadene maldika monstro, kiu konsistis el nur makzeloj kaj ungoj, kaj mi estis skuata, vere skuata, ekvidante ĝin.

Ĉu mi ne konas ilin, ĉi tiujn larvojn de la majskarabo, kiuj milope surrampas la florojn kaj sin kaŝas sub iliaj petaloj? Ĉu mi ne konas ilin kaj ankaŭ admiras ilin, ĉi tiujn persistajn, ruzajn parazitojn, kiuj sidas kaŝitaj kaj atendas, nur atendas, se necese eĉ dum semajnoj ĝis venas abelo, en kies flavenigra felo ili povas sin kaŝi? Kaj ĉu mi ne scias pri ilia malica lerteco, ĝuste kiam la eta ĉelkonstruinto plenigis ĉambron per mielo kaj sur ĝian supraĵon metis tiun ovon, el kiu elvenos la ĝusta posedanto de la ĉelo kaj de la mielo, ĝuste tiam malsuprenrampi sur la ovon kaj fervore ekvibrante resti sur ĝi kiel sur boato, ĉar se ĝi falus en la mielon, ĝi dronus?

Kaj dum la abelo kovras la fingrosimilan neston per verda tegmento kaj singarde enfermas sian idon, la flava larvo per akraj makzeloj disŝiras la ovon kaj konsumas ĝian enhavon, dum la ovoŝelo ankoraŭ devas servi kiel naĝveturilo sur la danĝera miellago.

Sed iom post iom la maldika flavulo fariĝas plata kaj granda kaj povas mem naĝi sur la mielo kaj trinki el ĝi, kaj en la pleneco de la tempo venas el la abela ĉelo graso, nigra skarabo. Sed certe ne tion la eta abelo volis produkti per sia laboro,

kaj kiel ajn ruze kaj lerte la skarabo agis, ĝi tamen estas nenio alia ol maldiligenta parazito, kiu meritas nenian kompaton.

Kaj mia abelo, mia propra diligenta abeleto, ĉirkaŭflugis kun tia parazito en la felo! Sed dum la araneo turnadis la abelon, la larvo malfiksiĝis kaj falis sur la aranean teksaĵon, kaj nun venas la granda flavruĝulo kaj ekpikas ĝin per la venenhoko kaj en unu momento transformas ĝin en skeleton sen vivo kaj enhavo.

Kaj kiam la eta abelo revenis, ĝia zumado estis kvazaŭ himnokanto al la vivo.

“Ho, vi bela vivo!” ĝi diris. “Mi dankas vin, ke mia loto estas la gaja laboro inter rozoj kaj sunbrilo. Mi daŭnkas vin, ke mi povas vin ĝui sen timo kaj maltrankvilo. Mi ja scias, ke embuskas araneoj kaj ŝtelas skaraboj, sed miaj estas la gaja laboro kaj la kuraĝa senzorgeco. Ho vi bela vivo, vi agrabla ekzistado!”

*El la sveda originalo tradukis
Birger Gerdman*

Merlin

de Edwin Muir

(Merlin estis legenda sorĉisto de malnova Anglujo je la tempo de la reĝo Arturo).

Ho, Merlin en kaverno el kristalo
Profunde en la taga diamanto,
Ĉu kantisto venos, kies gamo
Fine ebenigos per la kanto
La transan fingro-sulkon de Adamo
Faritan sur la ondo kaj la valo?
Aŭ kuristo, kiu preterpasos
La longan homan ombron kaj frakasos
Tempon, por remeti ĉe l' deveno
La pomon sur la arbon en Edeno?
Ĉu iam montros vi per sorĉa leĝo
La Dormantinon post ŝirmanta muro,
La tagon sub girlandamasa neĝo,
Kaj Tempon forŝlosita en la turo?

Brendon Clark tradukis

Ekvacio

Dum societa vespero Einstein ne povis senigi sin de trudemaj gasto, kiu nepre volis ekscii de la eminenta sciencisto la sekreton de la sukceso.

Ridetante, Einstein notis sur paperaĵon jenan ekvacion: $A = X$ plus Y plus Z .

“A,” li klarigis, “estas la sukceso; X la laboro kaj Y la bonŝanco.”

“Kaj kio estas Z ?” demandis la tedulo.

Einstein ridetis mistere. “ Z estas—silento...”

LA VIVO EN ITALUJO

Oni demandis min, kiel ni vivas en Italujo ; kaj mi preskaŭ hontas respondi : ĝenerale bone. Tio almenaŭ estas la impresoj, kiun eksterlandaj samideanoj deklaras al ni esti ricevintaj. Servoj funkcias, vendejoj estas plenplenaj de varoj, vagonaroj alvenas akurate, krimoj malrapide malpliigas, publikaj malordoj estas sporadaj, strikoj estas limigitaj . . . Pacema burĝo povus diri, la vivo estas normala. Mi ridis pasintjare pri mia svisa amikino, kiu timis viziti min ĉar “eble okazos malordoj en Italujo !” La manĝokuponoj ankoraŭ ekzistas sed nur por pano kaj pasto ; sed panon kaj paston oni povas trovi en ĉiu vendejo, eĉ en ĉiu elmontrejo, kun prezo proksimume triobla de la difinita prezo. Oni fakte povas manĝi kaj aĉeti kion oni volas se . . . Kaj jen la alia flanko de la medalo ; se la salajro tion permesas, kaj se vi eĉ havas salajron !

Se, ekzemple, oni estas ŝtatoficisto, profesoro, pensiulo, oni devas fari akuratajn kalkulojn pri la mono. Gimnazia profesoro ricevas de 25000 ĝis 30000 lirojn ĉiumonate ; kaj normala, ni diru preskaŭ antaŭmilita, manĝo por unu persono postulas ĉiutage en familia vivo (ne en restoracio !) de 500 ĝis 700 lirojn. En restoracio ĉiu manĝo kostas proksimume 500 lirojn. Sed familia vivo supozigas edzinon aŭ patrinon, do oni tuj vidas, ke profesora honorario ne permesas manĝadon, eĉ ne *nur nutradon*, de du personoj. Ni ne parolu pri loĝejo, lumo, varmigado, vestoj . . .

Kiel do solvas la vivproblemon ŝtatoficisto ? Aŭ li serĉas kromlaboron—kio plejofte estas bela revo, kaj kio certe ne bone efikas sur lian bazan laboron se li sukcesas, kaj krome sur lian sanon kaj rezistopovon ; aŭ li manĝas malpli. Tio signifas, ne uzi ovojn, sed nur ovpulvoron ; ne viandon, sed fazeolojn ; ne lakton, sed anstataŭaĵon nedifineblan ; kaj limigi la konsumon de pano, sukero, butero (se li povas aĉeti buteron) je nesufiĉaj kvantoj. Do ŝtatoficisto ne manĝas normale, sed ankoraŭ kiel dum la unua jaro post la milito. Ni ne diru, dum la milito, ĉar eĉ ankoraŭ mi demandas al mi, kiel oni povis elteni tian mankon de manĝaĵoj, kia estis dum la militaj jaroj !

Kaj oni kalkulas, ke dependas de la ŝtato preskaŭ dekono de la tuta popolo.

Sed oficisto aŭ profesoro kiu havas la feliĉon esti dungita ne protestas. La konkurantoj estas ja tiom multaj ! Tro da homoj eliras ĉiujare el universitatoj, kaj doktoro pri juro aŭ pri ekonomio ofte sidas malantaŭ modesta giĉeto en duaranga oficejeto. Tio venas el la stulta pensmaniero tre disvastigita en Italujo : la sopiro al doktoriĝo. Pro tio, riĉiĝinta kamparano sendas sian filon en universitaton ; pro tio, humila laboristo oferas

ŝvitige akiritan monon ; pro tio, burĝa familio rezignas pri nutrado ; pro tio, nobeloj aŭ bienistoj antaŭenpuŝas, kelkfoje eĉ nehoneste, seninteligentajn malfeliĉajn idojn sur la vojo al *doktoriĝo*. Tamen ekzameno de tiu situacio trenus nin tro longen for. Rimarku : ne temas pri nobla deziro altiĝi, aŭ plibonigi sian kapablon aŭ kleron. Plejofte, tute ne. Oni ŝafe faras, kion la ceteraj faras, sen pripensoj pri la sekvoj. Tiel okazas, ke elirantoj el universitatoj batalas unuj kontraŭ la aliaj por la ĉiutaga pano. Kaj ne nur instruistoj ; antaŭ la milito ni havis tro da inĝenieroj. Nun minacas esti tro da kuracistoj kaj da ekonomiistoj.

En Italujo ni estas tro multaj. Ankaŭ laboristoj suferas de la sama afero, kaj sekve ankaŭ la industrioj. Fabriko estas devigata ne maldungi superfluaĵojn dungitojn. Ne estas laboro por ĉiuj, ĉar la plimulto dum kvin, ses, jaroj de milito ne ellernis metion kaj nun ĉe ni troviĝas plenkreska viraro sen speciala kapablo. La industrio starigis tiel nomitajn *reabsorb-lernejojn* por plibonigi kaj specialigi la superfluaĵojn dependantojn, kiujn ili ne rajtas maldungi, kaj kiujn ili tute perde devas pagi. Kaj el tio sekvas krizoj en la uzinoj, plialtigo de prezoj, ĝenerala malbonfarto, strikoj, terura malviglo en la borso, baraktado de industriistoj en malfacilaĵoj . . .

Se oni povus elmigri ! Sed la alilandaj laboristoj kompreneble ne deziras la envenon de malsataj kolegoj, kiuj malaltigus la salajronivelon. Kaj tie ĉi ni eniras la politikan kampon . . .

La tuta mondo, ni scias, rigardis al Italujo dum la pasinta Aprilo, kiam ĉe ni okazis la ĝeneralaj elektoj. Ĝi rigardis kun diversaj, kontraŭaj sentoj. Mi penas esti kiel eble plej serena . . . Multaj estis la listoj, sed oni tuj sentis jam de la unuaj taktoj de la batala muziko, ke la lukto elvolviĝos inter demokristanoj kaj “popola fronto” (komunistoj kaj ekstremaj socialistoj). Ili svingis pli-malpli samajn promesojn. Sed ne necese estas akcenti, ke malantaŭ la unuaj stari, krom la katolika eklezio, ĉiuj burĝklasanoj pli-malpli riĉaj, la plimulto de la industriistoj kaj sume la personoj, kiuj pensis : “Nu, la eklezio estas konservema, ni ne volas ŝanĝojn, kaj ankaŭ ni ne volas perforton kaj sangon.” Malantaŭ la standardo de la *popola fronto* estis la plimulto de la laboristoj, konsiderinda parto de la intelektuloj, kelkaj industriistoj kiuj pensis iel savi siajn uzinojn kaj eble sian monon : sume, la nekontentuloj kaj ŝanĝemuloj. La du partioj enhavis kompreneble ankaŭ plenkredajn personojn, kiuj ne rigardis sian propran intereson, sed amis, ĉu laŭ kristanismo, ĉu laŭ marksismo, sian proksimulon, sed ĝenerale tiaj personoj ne estas la plej bruemaj.

Mi devas diri, ke bedaŭrinde por ni Italoj, sed neeviteble, ĉiu el la du partioj sin apogis sur fremdaj potencoj (mi diras *bedaŭrinde* ĉar mi opinias, ke ne helpas la pliproksimigon de fina mondunueco la fakto, ke nacio iĝu kvazaŭ kolonio, almenaŭ materie, se ne leĝe, de alia, pli forta potenco). Kaj se oni rigardas la mondkarton oni komprenas kial mi diris *neeviteble*. Sed la politika lukto, kvankam varmega, preskaŭ neniam eliris el la limoj de demokrateco kaj ni Italoj mem miris, en la tago de la elektoj, kiel trankvile kaj tute regule ĉio elvolviĝis. Frapanta estis la atmosfero de festo, eĉ de amikeco, kaj la serioza kompreno pri civilaj devoj kaj la reciproka respekto, kiuj regis en la envicigitaj aroj de voĉdonantoj. Multaj maljuneguloj, malsanuloj kaj akuŝantinoj volis esti portataj al la voĉdonejoj, la pacience staranta popolamaso sendistinge pri politika koloro ilin aplaudis. Kaj tiu estis la sama popolo, kiu sovaĝe luktis kontraŭ la faŝistoj dum la lastaj tagoj de la milito, kiu en ĉi tiu jaro mem, malbone kondutis kontraŭ S-ro Togliatti, ĉefo de la komunista partio, kiam li estis preskaŭ mortvundita. Misteroj de amasa psikologio! Aŭ ĉu eĉ la plej humila voĉdonanto tiam sentis, ke li skribas paĝon de la historio?

Venkis, kiel vi jam ŝcias, la demokristanoj. Ankoraŭ ne evidentiĝis ŝanĝoj en la kutima vivmaniero. La prezoj ne malpliigis, sed ankaŭ ne plialtigis; la problemoj restas, almenaŭ ĝis nun, sen solvo. La belaj promesoj, ĉu al laboristoj, ĉu ankaŭ al industriistoj, restas vortoj. Kaj ĉiuj grumblas. Tamen oni verŝajne ankaŭ grumblus se estus venkinta la popola fronto. Ni latinidoj estas nature grumblemaj kaj ĉe ni estas malnova proverbo: "Ĉu pluvos, kulpas la registaro!"

Eble la vero estas, ke la malsano kuŝas en ni homoj mem, kiuj sopiras al paco sed militas, sopiras al amikeco sed luktas, sopiras al sincereco sed... politikas. Diris Aristotele: "Homo estas socia besto." Kaj egoismo, necedemo, fiero, batalemo sin kaŝas en ĉiu homa koro. En tiu sama koro, kiu ja entenas ankaŭ la fajreron de amo kaj belo kaj bono kaj vero.

Kaj ni Italoj ja estas homoj...

C.C.

LA PETSKRIBO

Novaj Kolektivoj

Burnley & Dist. Weavers Assoc. (Teksista sindikato) Britujo	10,000
Burnley Miners Assoc. (Minista Sind.) Britujo	1,000
Bolton Weavers Assoc. (Teksista Sind.) Britujo	4,000
Blackburn Weavers Assoc. (Teksista Sind.) Britujo	5,617
Ortsverband der Gewerksch. des Kreises Lindau, Germanujo	3,200

Socialdemokratia Partio de Rheinhausen, Germanujo	6,851
Arbeitswohlfahrt (laborista bonfartsocieto) München, Germanujo	60,000
Europa-Union, M. Gladbach, Germanujo	100,000
Rada Związków Zawodowych, Zgierz, Polujo (prof. sind.)	1,946
Prof. asocio de Kemiaj laboristoj, Zgierz, Polujo	1,900
Ŝtatifabrikejo Zgierz, Polujo	2,400
Prof. asocio de Katunindustrio, Zgierz, Polujo	5,570
Związek Zawodowy Robotników i Pracowników Rolnych R.P.: Zargad Okregowy, Poznaniu, Polujo	37,684
Kolektivoj je malpli ol mil: kune	2,719
	242,887

Tuta sumo de kolektivoj ĝis 4.11.1948 ... 8,430,441

Ciferoj kontrolitaj ĝis 4.11.1949:

Landoj

Germanujo	5,897,146	Urugvajo	6,204
Ĉeĥoslovakujo	1,034,448	Hungarujo	6,161
Nederlando	1,022,118	Portugalujo	3,662
Norvegujo	490,382	Aŭstralio	3,375
Brazilo	212,856	Novzelando	2,540
Aŭstrujo	113,333	Svisujo	2,490
Francujo	96,158	Egiptujo	2,299
Svedujo	72,990	Grekujo	1,836
Belgujo	64,086	Maroko	1,330
Polujo	59,819	Palestino	531
Britujo	56,925	Irlando	463
Islando	28,348	Kanado	402
Bulgarujo	21,992	Hindujo	359
Jugoslavujo	14,138	Ĉilio	344
Italujo	13,991	Sudafriko	295
Danujo	9,111	Hispanujo	276
Usono	8,531	Ceteraj lokoj	835
Finnujo	6,390		
Argentino	6,248	sumo	9,262,412

Okupoj

Artistoj	2,138	Navigaciistoj	1,147
Delegitoj komunumaj	520	Parlamentanoj	263
Dentistoj	588	Policistoj	3,177
Desegnistoj	2,167	Presistoj	3,345
Dommastrinoj	46,029	P.T.T.-istoj	25,104
Edukaj aŭtoritatuloj	1,171	Religiistoj	1,549
Elektristoj	3,138	Sciencistoj	1,220
Farmaciistoj	1,346	Sindikataĉefoj	506
Farmistoj	48,377	Soldatoj	3,423
Hotelistoj	1,802	Studentoj	34,767
Inĝenieroj	14,056	Ŝoforoj	2,394
Instruistoj	34,691	Ŝtatoficistoj	33,149
Juristoj	1,80	Teksistoj	35,033
Ĵurnalistoj	1,239	Transportistoj	493,083
Komercistoj	60,348	Urboficistoj	3,786
Konstruistoj	6,562	Vendistoj	9,314
Kuracistoj	4,560	Vestistoj	6,388
Laboristoj	123,603	Diversaj	8,225,520
Lingvistoj	1,540		
Metiistoj diversaj	23,569	sumo	9,262,412

ESPERANTO EN LA PRAKTIKO

Instruistoj-esperantistoj. Per ĉi tiu alvoko ni tre urĝe petas vian helpon en grava afero.

En la baldaŭa estonteco la ĵus elektita parlamento devos starigi novan leĝon pri la preparo de estontaj instruistoj. En Nederlando oni scias malmulte pri la eduka kaj instrua sistemoj en aliaj landoj. Mi tial havas la intencon verki en kunlaboro kun konata lernejestro broŝuron pri la preparo de estontaj geinstruistoj en diversaj landoj. Por kolekti la necesan materialon mi turnas min al vi, karaj gekolegoj, kaj afable petas vin, bonvolu plej vaste informi min pri la problemo: Kiel oni preparas en via lando la estontajn geinstruistojn? Por povi fari taŭgajn komparojn mi petas en via respondo atenti la jenajn punktojn: antaŭsciojn; hortabelojn; daŭron de la preparo (teoria kaj praktika); aĝon ĉe la komenco de la studo; instrumentadojn, aplikatajn en la seminarioj; el kiuj sociaj rondoj venas la lernantoj; kiel kaj kiam instruisto povas fariĝi lernejestro. Se eble bonvolu aldoni fotojn pri klasĉambroj, gimnastikejoj k.s.

La broŝuro estos presata en la nederlanda lingvo kun traduko en Esperanto kaj estos sendata al la nederlanda registaro kaj al ĉiu, kiu havigis al ni taŭgan materialon. La adreso, al kiu vi sendu la materialon, estas: S-ro F. Weeke, van Beverningkstr. 125, Den Haag, Nederlando.

* * *

A.N.S.E. La Asocio de Nederlandaj Scienculoj Esperantistaj (sekretariejo: Eekhoornlaan 10, Bennekom) atingis, ke la redakcio de *Tijdschrift voor Tandheelkunde* (gazeto por dentkirurgio), adreso Luykenstraat 52, Amsterdam, enpresigas Esperanto-tradukojn de la titoloj de la plej gravaj artikoloj en ĉiu kajero. La redakcio disponigos al petontaj dentistoj maŝinskribitajn resumojn en Esperanto kontraŭ alsendo de internacia respondkupon.

Krome, ANSE kunlaboris, ke en la nova scienca gazeto *Vegetatio* (redaktoro prof. J. Heimans, Leonardstr. 10, Amsterdam-Z) aperis angla artikolo pri *Metodo kaj supervido de karakterizado de nederlandaj herbejoj* kun Esperanta resume (8 paĝoj entute).

La sekretario de ANSE urĝe petas ke nefakanoj ne ĝenu la redakciojn per petoj pri alsendoj.

Dua internacia muzikfesto: Llangollen Kimrujo, Junio 1948. Pro ricevo de raporto je tempo netaŭga kaj posta manko de spaco, nia gazeto ankoraŭ ne informis pri ĉi tiu kimra muzikfesto laŭ internacia skalo. La partopreno Esperantista estis tre modesta, ĉefe pro la neeblo,

ke iuj ĥoroj venu sekve de diversaj baroj. La organizintoj uzis la okazon por propagandi Esperanton kaj vendis kvanton da lernolibroj. El la detala raporto ni ĉerpas kelkajn liniojn aparte legindajn:

... dank' al vicprezidanto D-ro Hurdes (Instrumministro de Aŭstrujo) de ni proponita, alvenis la Viena Akademia Ĥoro kun solistoj, kaj per niaj klopodoj alvenis ankaŭ la Berna Jodloklubo, kiu tiel rave kantis ĉe la 32-a Kongreso. Tamen la rilata korespondado okazis per la angla lingvo, do oni povis fari la konstaton, ke helpis plivere la Esperantistoj, ol Esperanto mem. Sed la Berna jodlistaro forportis kvintajn Esperanto-lernolibrojn, kaj ni disdonis ŝlosilojn kaj adresojn de landaj asocioj ankaŭ inter aliaj ĥoroj. Ĉi tiun senpagan disdonadon ebligis la afabla kaj helpema S-ro Whidbourne, kiu donacis unu pundon por tiu celo.

Ni volas akcenti, ke nia svisa ĥoro estis aparte simpatia. Ĝi faris specialan vojaĝon al ortopeda hospitalo por kanti al la pacientoj, kaj kiam vilaĝanoj en alia loko volis monkollekti por la svisoj, ĉi tiuj petis, ke eventuala kolekto iru prefere al la hospitalo.

Ĉiam nur al ni la svisoj venis por helpo kaj informiĝo, kaj kun kora amikeco ili kantis speciale por la Esperantistoj kvar belegajn jodlojn, unu en Esperanto. Ĉe tiu kunveno la ĥoro prezentis al la Esperanta sekretariino bernan urson vive skulptitan el ligno, ŝtrumpojn kaj svisan ĉokoladon. Ŝi estis ravita!


Utile estus, ke por la tria muzikfesto niaj organizaĵoj interesiĝu pri ĉi tiu unika okazo penetri per praktika servado en interesan medion.



Ajlina Parry; Karola Rossetti.
Esp. sekretariinoj de la Muzikfesto.

TRA LA LIBRARO

*=akireblaj ĉe U.E.A.



***La Juna Vivo : Internacia Kantaro.** Kompilis kaj eldonis J. Muusses, Purmurend, Nederlando. 48 p. broŝ. 1ŝ. 9p. afranko 2p. (8 rpk.)

Post multaj jaroj de muzika kaj Esperantlingva lernejinstruado mi fine trovis en ĉi tiu verko kantojn speciale intencitajn por la infanaro, kun melodioj sufiĉe allogaj kaj kun tekstoj de plimalpli natura vortordo—rimarkindaĵo en la Esperanta poezio. Eĉ en tiu ĉi kantaro tamen troviĝas kelkaj ekzemploj de fraza distordo pro metrika kaj rima kialoj, kun rezulta neklareco, ekzemple : *Ne gravas, mi ja trovis, tre kion ŝatis vi* (n-ro 12). Se la aŭtoroj de la kantoj en tiu ĉi kolekto eraris, estas ke la plimulto de la kantoj eble taŭgas plie por tre junaj infanoj.

La ĝenerala aspekto de la libro plaĉas ; papero bona, preso klara kaj bonstila. La muzikpresas varias laŭ siaj diversaj fontoj, enhavante ankaŭ bone manskribitajn kantojn. La muziknotsistemoj estas : *liniara* (melodio nur, sed — bedaŭrinde nur ĉe la unuaj 20 kantoj—kun radikoj, majoreco kaj minoreco de akordoj, septoj kaj inversigoj superliniare montritaj), *numerala* (kun gamnoto, ankoraŭ nur ĉe la unuaj 20 kantoj), sed malfeliĉe ne la *solfaa*.

Lando de deveno aŭ komponisto kun devenlando, tradukinto k.t.p. estas indikitaj. La kantoj estas el diversaj landoj, kaj tial pli plena humor- kaj sent-indiksistemo (*dolĉe, trankvile, moderate* k.s.) estus bonvena ĉe multaj fremdlandaj instruistoj.

Gramatike la tekstoj estas bonaj, mi trovis nur malmultajn erarojn. Kelkaj kantoj, precipe du el la lastaj trokeaj (22, 23) kaj la certe amota *Piulino* (13) feliĉe estas senapostrofaj. Tiu lasta uzas la bezonatan radikon *darf* tre necesan en la *pov-, dev-serio*. Restas do nur senrezerve rekomendi la kolekton al ĉiu muzikinstruista Esperantisto deziranta porjunulan materialon, kaj gratuli la kompilintojn pro multe bezonata lernejolibreto.

H. C. Allen

***Kantareto** kompilita de Jan kaj Karel Filip ; eld. F. Buhr, Praha. 16.5×12.5 cm. 62 p. broŝ. kun muziknotaro ; prezo 5ŝ. 3p. afranko 3p.

Unu el la ĝojoj de esperantista vivo estas la ebleco partopreni en la popolaj festoj de aliaj landoj, eĉ se nur letere. Tial la eldoniĝo de esperantigitaj popolkantoj estas notinda okazo. Ĉeĥoslovakujo posedas riĉan trezoron de popolkantoj en multaj humoroj—gaja, kvieta, sopira,

energia, ĉagrena, pia, viveca, dolora. Ĉiaj troviĝas en la kantareto de Jan kaj Karel Filip.

Nekonante la originalajn vortojn mi ne povas taksii, ĉu la tradukintoj fidele speguligis ilin. La esperantaj vortoj de kelkaj el la kantoj ne estas allogaj, sed plejofte la arioj kaj la vortoj de la kantoj kune tentas al kantado. Feliĉe, ke ankoraŭ restas pli da kanttrezoroj ĉeĥoslovakaj por plenigi ankoraŭ similan libron.

*Kial nune ni ne ĝoju
Kiam saĝon donas Di' ?*

H. W. Holmes

***Faktoj pri Danlando ;** internacia serio de *Kiu-Kio-Kie* eld. Politikens Forlag 1948. 17×12 cm., 64-paĝa, broŝ., prezo 3 ŝil. 9p. afranko 3p.

Jen bonega libro, informanta koncize, telegrafstile pri Danlando. Geografio, historio, ekonomio, politiko, armeo, aertrafiko k.t.p. ĝis rubriko *Kiu estas kiu ?* biografiaj notoj kun fotoj de eminentaj danoj. Frapantaj desegnoj faciligas tujan komprenon pri distribuo (divido) laŭokupa de la loĝantaro kaj simile pri la plej grandaj urboj de Danlando.

La originalon verkis danlingve Helge Larsen, Bo Bramsen kaj Finn Rosetzky. Tradukis ĝin Poul Thorsen kaj H. V. Rasmussen. Ni esprimu sinceran dankon al tiu ĉi feliĉa iniciato de praktika verketo (eldono 5000 ekzempleroj). Du, espereble ne *piajn*, dezirojn ni volus esprimi : ke la libro rapide vendiĝos kaj ke aperos similaj pri aliaj landoj.

Ni (ne la fremdulaĉoj) ; eld. G. Marin, "La Bosketo" Whiteway apud Stroud, Glos., Anglujo. 11×11 cm. 16 p. prezo 2 rpk.

Trafa ironiaĵo pri la kolektiva egoismo, la naciismo, esprimita per mallongaj frazoj kun responda desegnaĵo. Kaj kiel konkludon, G. Marin metis la eldiron de Einstein : La liberigo de la atom-energio ne kreis novan problemon. Ĝi nur urĝigis la necescon solvi unu malnovan problemon. Tiel longe kiel ekzistos suverenaj nacioj, posedantaj grandan potencon, pli aŭ malpli frue milito ne estos evitebla. H.J.

Korekto : en la lasta numero ni menciis, ke la prezo 13ŝ. 8p. estas pro nur tekstaro de *Sovaĝaj Bestoj de Afriko* (Esperanto Film-Grupo). Tiu prezo estas inkluziva de ankaŭ filmstrio.

SYNNØVE SOLBAKKEN

Bjørnstjerne Bjørnson

Plaĉa Norvega rakonto tradukita de Edith kaj August Weide

2ŝ. 3p. aŭ 9 rpk. afrankite

Mendu ĉe U.E.A.

ESPERANTO KAJ RADIO

Redaktas S-ro A. C. Oliver, 120, Heronsgate Road, Chorleywood, Rickmansworth, Anglujo, al kiu oni sendu senescepte ĉion pri tiu rubriko

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Ĉiutage	15.30-15.45	Praha. 1935m. kaj 31.41m. I.
	17.15-17.30	Paris. 41.21m. Radio-diffusion Francaise, Emissions espérantistes vers l'étranger, 118 Champs-Élysées, Paris 8.
	21.00-21.15	Praha. 49.92m. P.
Lundo	11.30-11.40	PRG2 (Brazilo). 104m. P.
	21.50-22.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
	22.00-22.30	Ĉeĥoslovakujo. 269m. kaj 325m. Verda Stacio. Arto-programo. (Nur la unuan London de la monato).
	23.30-23.35	Budapest I. 549.5m. I. Hungara Radio, Budapest VIII, Bródy Sándor u. 7.
Mardo	17.55-18.00	Bern. 25.61m. kaj 48.66m. P. de D-ro Baur. Schweizer Kurzwellendienst, Neungasse 28, Bern.
	18.50-19.00	Sofia. 32.09m. P. Radio Sofia.
	20.45-21.00	Hradec Králové. 238m. (Krom la unua mardo).
	21.00-21.10	Ostrava. 259m. Radiostacio Ostrava, Bráfova 5 (krom la unua mardo de la monato.)
Merkredo	10.15-10.35	Paris. 431.7m. K.
	21.10-21.25	Warszawa III. 48.25m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszykowa 8.
	23.30-23.35	Budapest I (kiel je lundo).
Ĵaŭdo	17.45-18.00	Hradec Králové. 280m. Vychod-očeky vysilač, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo.
	17.45-18.00	Wien II. 31.05m., 41.81m. kaj 228.6m. K. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.
	17.55-18.00	Bern. 25.61m. kaj 48.66m. P. de D-ro Privat.
	21.50-22.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
	21.00-21.10	Ostrava. 259m.
Vendredo	18.50-19.00	Sofia. 32.09m. P. Radio Sofia.
	23.30-23.35	Budapest I (kiel je lundo).
Sabato	12.00-12.15	München. 405m. kaj 48.70m. kaj Nürnberg 315.8m. K. (ĉiun duan sabaton.)
		Radio München, Kulturabteilung Rundfunkplatz 1, München, Bayern, Germanujo.

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horszistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Ni petas informon pri necesaj aliigoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratulleterojn kaj informojn pri ricevo.

KUDRA KAJ TRIKA TERMINARO

M. kaj V. Verda
9 pencoj aŭ 3 respondkuponoj
Mendu ĉe U.E.A.

LA ANGULO DE LA PROPAGANDISTO

36. Laŭ la konsilo 23 la tutmonda Esperantistaro devas peti per multaj leteroj Esperantlingvajn dissendojn el tiuj radiostacioj, kiuj ankoraŭ ne uzas Esperanton. Unue oni devus koncentrigi la fortojn al unu grava: la Moskva Radio.

37. Ĉiuj landaj kaj lokaj Esperanto-organizaĵoj devas skribi al la menciita radiostacio petleterojn pri Esperantaj elsendoj. Ĉiuj leteroj estu bone motivitaj.

38. FDP-oj kaj D-oj kaj gvidantoj de Esperanto-organizaĵoj faru sian eblon, ke ĉiu unuopa Esperantisto skribu leteron aŭ pk. La unuopuloj skribu ankaŭ pri tio, kion ili deziras aŭdi en la dissendoj (novaĵojn pri la sovetiaj literaturo, arto, sporto, scienco, ĉiutaga vivjunularo aŭ similaj temoj). Oni povus ankaŭ menci muzikon kaj mallongajn teatraĵojn.

39. Instruistoj kaj lernantoj klopodu subskribigi siajn leterojn per la membroj de la lerneja klaso aŭ ties plimulto. Samideanoj, membroj de sindikatoj aŭ fakorganizaĵoj, agu simile.

40. Se oni atingos favoran rezulton, tio estos granda sukceso kaj altvalora gajno por la Esperanto-movado. Tial Esperanto-gazetoj bonvolu repres ĉi tiujn petojn kaj klarigu per konvena artikolo por atingi plej vastan publikon.

Kiel propagandi kurson? Nia agema samideano, Ing. Rud. Novák en Plzeň, Ĉeĥoslovakujo, komunikis efikan manieron reklami kurson de Esperanto kaj rekomendas ĝin al aliaj propagandistoj. Temas pri afiŝo en ordinara amplekso, ekzemple duobla folio de komerca leterpapiro. Teksto en nacia lingvo. Ni reproduktas la tekston:

Internaciaj Servoj

por komerco, trafiko, laboro, dungo, salajrkondiĉoj, turismo, instruado, junulaferoj, studentoj, k.t.p. estas facile riceveblaj per la internacia lingvo

ESPERANTO

La Delegitoj de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO estas troveblaj en la plej gravaj urboj de la mondo kaj la Adresaron ricevas ĉiu membro samtempe kun la rajto uzi la servojn de la Delegitoj.

Se vi volas krei al vi internacian amikecon, havi amikojn en fremdlando sen la peniga lernado de fremdaj lingvoj,

lernu la internacian lingvon

kaj vi krom ĉi tiu supre menciita avantaĝo kunhelpos al la paca idealo. Kurso por komencantoj:

ENIGMA KONKURSO N-ro 33

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, Brussel-Uccle, Belgujo.


Solvoj de la enigmoj en konkurso n-ro 31 :

N-ro 67 : Horizontale oni legas : radioterapio, asertipaletro, novicoizolit, universitato, nazojoktavog, knaradoavelr, oceanopeonao, lornodorlotf, amoĝbetoobei, coloanagramo, orioldneenod, jutkariofilo.

N-ro 68 : Krokodilo, idiotismo, akuzativo, revolucio, erizipelo, gutaperko, argumento, narkotiko, trankvila, originala, transepto, intermiti, astronomo, specimeno, esperanto, riverenco, vertikala, atmosfero, nepotismo, tuberkulo, orografio.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 29-a konkurso : S-ro W. Simon (Usono) 122p., S-ro H. Evers (Ned.) 120p., S-ro A. H. v. d. Broek (Ned.) 104p.

Enigmo N-ro 71 : Krucvortenigmo.



Horizontale : 1. kun 58. Mi esperas ke la figuro pensigos pri tiu festo ; 5. entuziasmaj knabinoj ofte uzas tiun vorton ; 7. planto kun belformaj floroj (r) ; 10. planto (r), anagramo de korelativo ; 11. peza metalo ; 12. konforma al la reguloj de beleco ; 14. obstina homo ofte faras tion (r) ; 15. laborema besteto ; 17. muzika ritma melodio (r) ; 19. paco ŝajnas esti tio (r) ; 22. multe da ili troviĝas en Venecio ; 24. kiu volas fari tion, devas rompi ion (r) ; 26. por difinita tempo ricevi ion kontraŭ pago ; 27. prepozicio ; 28. ronde forte agiti ; 30. parto de ampleksa libro (r) ; 32. konjunkcio ; 33. palpilo de radioaparato (r) ; 35. vegetaĵo kun manĝebla radikoj (r) ; 37. sufikso ; 38. senefika (r) ; 39. trinkaĵo (r) ; 40. refaldita bordero ĉe tuko ; 42. mistera lando (r) ; 44. satiga legomo ; 46. prefikso ; 47. okulkavo (r) ; 49. malpli ol io ; 51. persona pronomo ; 53. plej ofta metalo (r) ; 54. militista kapvesto (r) ; 55. bona ekzemplo de la proverbo : se gut' al gut' aliĝas, maro fariĝas (r) ; 57. ordonanto ; 58. vidu l.

Vertikale : 1. liberigita el ŝuldo ; 2. prefikso ; 3. persona pronomo ; 4. metaforo ; 5. efektive ekzistanta (r) ; 6. akuta (r) ; 8. moviĝi al difinita loko ; 9. kion edziĝanto akiras ; 13. estro de monaĥejo ; 14. facile klasigebla

paperfolieto ; 16. peceto ; 18. malfluida (r) ; 19. profite uzebla ; 20. majesta (r) ; 21. ĉarma infano (r) ; 23. ne pli ol ; 25. herbaĉo (r) ; 28. kojnoforma najlo ; 29. peti ke iu venu (r) ; 30. mortiga substanco (r) ; 31. manlabora profesio ; 32. prepozicio ; 34. de malsupre supren : frapo (r) ; 36. aserto defendata de iu persono (r) ; 40. nombro ; 41. infano kies gepatroj mortis ; 42. despoto (r) ; 43. anagramo por ligna kvarangula ujo ; 44. spicaĵo (r) ; 45. unuo de elektra rezistanco (r) ; 46. ripetigo de diro (r) ; 48. frukto (r) ; 50. nekonfuza kaj preciza (r) ; 52. instrumento (r) ; 56. artikolo ; 57. prefikso.

Enigmo N-ro 72 : Ĉi-sube sekvas 14 dekliteraj vortoj, de kiuj nur la du mezaj literoj estas konataj :

. . . - is - . . .
. . . - nt - . . .
. . . - ke - . . .
. . . - ci - . . .
. . . - ol - . . .
. . . - nt - . . .
. . . - do - . . .
. . . - po - . . .
. . . - ci - . . .
. . . - mi - . . .
. . . - to - . . .
. . . - ok - . . .
. . . - ma - . . .
. . . - tr - . . .

Ĉiu vorto komenciĝas kaj finiĝas per unu el la sekvantaj litergrupoj, kiujn vi do metu sur la punktojn.

amo - anu - apo - boj - cer - cio - dro - edo - eti - eti - fla -
foj - gal - gio - hek - hip - inf - ino - psa - rio - rio - rno -
sal - toj - tra - upo - vel - via.

La kvarajn kaj sepajn literojn (la streketoj) vi mem elektu, tiel, ke ekestas la nekonataj vortoj. En tiuj du kolonoj (4-a kaj 7-a) vi tiam legos du esprimojn el la *Proverbaro Esperanta* de D-ro Zamenhof.

Al ĉiuj solvantoj mi deziras agrablajn kristnaskajn tagojn.

Flandra Ligo kaj La Estonta Estas Nia

Inter la Nederlanda Asocio "La Estonto Estas Nia" (L.E.E.N.) kaj la Flandra Ligo Esperantista (V.E.B.) realiĝis kontrakto por intima kunlaborado, ĉar necesegas kunligo de fortoj inter esperantistaj unuiĝoj de diversaj landoj kaj precipe inter tiuj de Nederlando kaj la Flandra parto de Belgujo, sekve de la komuna lingvo nacia.

La kunlaborado efektiviĝos jam de 1.X.1949 kaj ĉefe celas :

1. eldonadon de komuna Esperanta gazeto sub malsama titolo ;
2. kunlaboradon, kiel eble plej multe, de ambaŭ libroservoj ;
3. kunlaboradon okaze de partoprenado al kongresoj, somerkursoj k.t.p.
4. interŝanĝadon de ideoj je eventuala eldono de propagandiloj.

Tiu kunlaborado validas por nedifinita tempo.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 211

3an de Novembro 1948

NOVAJ DELEGITOJ

Britujo

Leeds. FD (Virinaj aferoj) : F-ino M. O. Langrick, Bay Horse Farm, Shadwell. Tel : Thorner 49.**Oxford.** FD (Bahaismo) : D. P. Faux, 15 Kinton Road, Abingdon Road.

Hungarujo

Vencsellő. FD (Religio) : Pastro B. M. Koppány.

Italujo

Lecce. D : D-ro V. de Benedetto, Largo Teatini 2. Tel : 1495.

Jugoslavujo

Zemun. D : B. Rajšić, Rajačiceva 1.

Madejro

Ponto do Sol. D : F-ino M. E. Vieira Caetano, Residência Paroquial.

Nederlando

Zeist. D : C. J. Keur, P. C. Hooftlaan 45.**Zutphen.** D : H. Hasper, Hobbemakade 63. Tel : 244.

Polujo

Wroclaw. FD (Ŝako) : E. Misiurewicz, ul Gorlicka 16 m.3, Wroclaw 10.

Portugalujo

Viseu. D : D-ro José Bigotte de Almeida, Bairro Novo do Liceu.

FD (Filatelo) : La D.

ŜANĜOJ

Britujo

Painswick. FD (Gazetaro) : vakas.

Ĉeĥoslovakujo

Tyn n. Vit. D : vakas.**Udol sv. Kryštofa.** D : vakas.

Germanujo

Konstanz. D : nova adreso : Turnierstr. 27.

Hungarujo

Jászfényszaru. D : vakas.**Vac.** D : nova adreso : Március 15 tér 2.

Jugoslavujo

Varazdin. FD (Komerco) : nova adreso : Gorana Kovačića 13.

Nederlando

2e Exloërmond. D : vakas.**Haulerwijk.** D : vakas.**Soest.** D : vakas.

Portugalujo

Guarda. D. kaj FD (Filatelo) : vakas.**Lisboa.** FD (Turismo) : nova adreso : Vila Nova de Carriche, J.G.B., Olival Basto.

STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la 31a de Oktobro 1948, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Oktobro 1947 :

	1947	1948
Asociaj Membroj ..	8242	9453
Individuaj Membroj :		
MJ	1122	966
MA	5290	4513
MS	293	344
Patronoj ..	22	21
DM	151	172
HM	53	56
	6931	6072
	15173	15525

NOVA DUMVIVA MEMBRO

S-ro H. P. Devenish, Duncan, B.C., Kanado.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1948

344. S-ro J. Moreira, Rio de Janeiro, Brazilo.

345. S-ro I. Povoden, Trbovlje, Jugoslavujo.

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario*.

INTERNACIA KONKURSO 1949

La internaciaj konkursoj pri membreco aranĝitaj de IEL antaŭ la milito elvokis tiom da intereso kaj entuziasmo, ke la Estraro je Pasko decidis aranĝi similan konkurson por 1949. La Komitato de UEA en Malmö akceptis planon pri la fikso de kvotoj por la diversaj landoj, sed ni povos doni informon pri tiuj kvotoj nur post la fino de la nuna jaro. La informo aperos en la gazeto de Februaro, kaj ĉiumonate poste aperos artikolo pri la progreso de la konkurso.

Por ĉiu membro aliĝinta al UEA por 1949 estas donataj poentoj laŭ jena tabelo :

Asocia membro	1
Membro kun jarlibro ..	5
Membro-abonanto	10
Membro-subtenanto ..	15
Patrono	50
Dumviva membro (nova) ..	50

Al la aliĝinta Landa Asocio en la lando aŭ regiono, kiu montris la plej bonan progreson dum la jaro kompare kun la kvoto fiksita UEA donos premion £10 (175 svisaj frankoj). Al ĉiu delegito en la koncerna lando ni sendos libro-premion.

Malgraŭ la nunaj malfacilaĵoj, pro kiuj samideanoj en multaj landoj ne povas aliĝi al UEA, eĉ se ili tion deziras, ni rigardas al la estonteco kun fido kaj espero. Per la bonvola helpo de ĉiuj delegitoj kaj membroj ni certe atingos nian celon. Ne forgesu, ke ju pli granda la membraro des pli bonan gazeton ni povos liveri al vi. Agu nun por varbi viajn amikojn al UEA.

SVEDA ESPERANTO-GAZETO
"LA ESPERO"

jam trovis admirantojn tutmonde pro interesa enhavo, bela preso kaj regula apero. Se vi deziras aboni ĝin dum 1949 vi povas pagi

la abonkotizon 8 ŝil. 4p.

al ni kaj vi ricevos rekte el Svedujo ĉiumonate 8-, 12-, aŭ 16-paĝan numeron ĉefe esperantlingvan.

U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo



**INFORMA
EDUKA
INTERESA**
kun multaj bildoj

FAKTOJ PRI DANLANDO

Unuaranga poŝformata konsultlibro kun granda provizo da informoj kaj sciindaĵoj pri la danaj popolo, lando, industrio, trafiko, komerco, administrado, edukado, kaj kun ilustrita "Kiu estas kiu?"

Prezo 3ŝ. 9p., aŭfranko 3p.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

SUPER-PROPAGANDO

Dum la pasintaj monatoj ni ricevis multajn petojn por nia **Interacia Poŝtmarka Katalogo** el landoj, kie oni ne povas sendi monon.

Bedaŭrinde, restas ĉe ni pli ol 2000 ekzempleroj de tiu libro kaj ni tial ne povas reenspezi niajn kostojn nek donaci al la mondo tiun superkvalitan propagandilon.

Por kontentigi ambaŭ dezirojn ni ofertas la katalogon al ĉiu; **kiu sendos sialandajn freŝajn poŝtmarkojn** ĝis la valoro de kvin anglaj ŝilingoj. Sendu seriojn prefere, se eble.

Lukse presita; taŭge bindita; plene ilustrita; Esperanta kaj angla tekstoj pri la poŝtmarkoj de Grand-Britujo. Kelkaj artikoloj pri la klasikaj eldonoj, artikolo pri Esperanto, kaj nunaj prezoj de ĉiuj cititaj poŝtmarkoj. Sendu vian mendon kun la poŝtmarkoj al:

**La Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj,
XPDO, DIDCOT,
Berks., Anglujo.**

Literatura Mondo

la bela literatura revuo en Esperanto.
Formato 29 × 20 cm. Aperas provizore
ĉiun duan monaton.

★

Jarabono 1949 15 anglaj ŝilingoj

★

Sendu vian abonon al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Atentu !

Atentu !

Dokumentoj de la Rezistado 1933-1945

Bildoj el la germana rezistado kontraŭ la naziismo dum la plej nigra periodo de la germana historio.

60 paĝoj, ilustrita

Prezo 2.20 DM aŭ 8 respondkuponoj.

Mendu tuj. Limigita eldonkvanto.

Mendante 10 ekz. rabaton de 25%

ESPERANTO-CENTRO
Im Hag 18, Hamburg-Gr. Flottbek, Germanujo

TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO

ekzistas 10 jarojn. Tiukaze aperis 16-p. ilustrita propaganda broŝuro, kiu enhavas detalajn informojn pri la estiĝo kaj disvolviĝo de T.J.O. kaj Denaska Esperantistaro, statuto de T.J.O., kaj liston de perantoj. Ĉiu, kiu vere interesiĝas pri la junular-laboro nepre mendu la broŝuron ĉe

TJO-CENTRO

West Graftdyk, Nederlando

Prezo : 5 pencoj aŭ 1 int. resp. kupono

ALLOGAJ LIBROJ

Streĉita Kordo. K. Kalocsay ..	broŝ. 7 ŝil.
Tragedio de l'Homo. E. Madách (K. Kalocsay) ..	broŝ. 6 ŝil.
Infero. Dante (K. Kalocsay) ..	broŝ. 11ŝ. 6p. bind. 14ŝ. 6p.
Arthistorio. K. Kalocsay ..	broŝ. 16ŝ. 6p.
Parnasa Gvidlibro. Kalocsay kaj Waringhien ..	broŝ. 6 ŝil.
Enciklopedio de Esperanto. Bleier, Kókény, Ŝirjaev. Sen ilustraĵoj	broŝ. 32ŝ. 6p.
De Paĝo al Paĝo. L. Tárkony	bind. 6ŝ. 9p.
Dekdu Poetoj. K. Kalocsay	bind. 6ŝ. 9p.
Fine mi komprenas la radion. E. Aisberg	broŝ. 8 ŝil.
Verkaro de Fez. E. Wiesenfeld	broŝ. 11ŝ. 6p.
Rigardu la Teron. Van Loon (Saville) ..	broŝ. 23 ŝil.
Arĝenta Duopo. Kalocsay kaj Baghy	broŝ. 7ŝ. 6p.
Svisa Antologio. A. Baur	broŝ. 23 ŝil. bind. 26ŝ. 6p.
Rimportretoj. K. Kalocsay	broŝ. 2ŝ. 6p.
La Sorĉistino el Kastilio. Asch (Lejzerovicz)	broŝ. 5ŝ. 6p.
Pri l'Moderna Arto. Grenkamp-Bzrekowski	bind. 6 ŝil.
La Juda Ŝtato. Herzl (Selzer) ..	broŝ. 5 ŝil.
Auli. H. Adamson	broŝ. 3ŝ. 6p.
El la verda biblio. I. Lejzerovicz	broŝ. 2ŝ. 6p.
Tri homoj en boato. J. K. Jerome (Badash) ..	bind. 10ŝ. 6p.

Aldonu 10% por afranko.

Eldonitaj de
LITERATURA MONDO, Budapest

Mendu ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo